



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 7
1969

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-periodo
35-a (40-a) jaro
Monata

La 41-a Norvega Esperanto-Kongreso

Nia 41a landa kongreso okazis dum la semajnfino 21.—22. de Junio en la turistkabano Budor apud Løten. Pri la perfekta aranĝo respondecis nia plej juna klubo, «La tri verdaj Steloj de Løten». Prezidanto de la Loka Kongresa Komitato estis Per Johan Krogstie, komitatanoj el Orienta, Okcidenta kaj Meza Distriktoj, inter ili ankaŭ 5 rektaj membroj, pluraj sve-daj kaj unu pola gastoj. La ejo estis tre taŭga, kaj la estrino, f.ino Britt Dahl, faris ĉion por agrabligi nian restadon.

Sabaton je la 12a Krogstie bonvensalutis la kongresanojn, poste urbestro Hjelsengsveen bonvenigis nin al Løten, kaj C. Støp-Bowitz dankis pro la bonvenigoj kaj formale malfermis la kongreson. Sekvis salutoj de klubaj reprezentantoj kaj gastoj.

Post bongusta lunĉo komenciĝis la laborkunsidoj, pri kiuj vi trovos raporton aliloke en ĉi tiu numero. En la kunveno troviĝis ankaŭ budo de Eldonejo Esperanto A/S.

Sabaton vespere okazis la kon-

gresafesteno. Bele aranĝita tablo kaj bongustaj manĝaĵoj. Ĉe la tablo parolis Krogstie, urbestro Hjelsengsveen, festparoladon faris la prezidanto de N.E.L., C. Støp-Bowitz, por la virinoj parolis Johan Matland. Kafo en apuda salono. La ĥoro de Klubo Esperantista en Oslo kantis, la teatra grupo prezentis skeĉon, Johan Matland aperis kiel sorĉisto. Dancado kaj kantado laŭ akordiona muziko de Asbjørn Syslak kaj C. Støp-Bowitz.

Dum paŭzo eniris la procesio de la Ordeno de N.E.L., Pro Merito. La gradon Komandoro de la 1-a klaso ricevis Johan Hammond Rosbach, Komandoro de la 2a klaso Halvdan Karterud, kaj estis nomataj 3 novaj Kavaliroj de la 2a klaso: John Berggreen, Oslo, Norman Birkeli, Sauda, Per Johan Krogstie, Løten. — En la varma, bela somermeza nokto multaj kongresanoj faris promenon en la bela ĉirkaŭaĵo antaŭ ol enlitiĝi.

Dimanĉon matene paroĥestro Hans Amund Rosbach predikis ĉe

Diservo en la kapelo de Budor. Poste sekvis daŭrigo de la labor-kunsido, kiu pro la belega, varma vetero okazis en libera aero sur la herbejo antaŭ la domo.


Post lunĉo ni rapidis al la centro de Løten, kie estis okazonta la granda evento: inaŭguro de «Esperantovegen», la tria Esperantostrato en Norvegujo. Denove manifestiĝis la aranĝa talento de Krogstie kaj liaj helpantoj. Sed pri tiu evento en aparta raporto. Finfine la komunumo Løten regalis nin per kafo kaj amaso da kukoj en Tingberg Kafejo. C. Støp-Bowitz dankis al la komunumo pro ĝia ĉiel helpa kaj pozitiva sinteno al nia kongreso, kaj Krogstie fine dankis per floroj al ĉiuj, kiuj iel kunlaboris por sukcesigi la kongreson. Sinceran dankon al Løten kaj al ĝia energia Esperantoklubo!

Partopreninto.

La 3a Esperanto-strato en Norvegujo

La komunuma estraro de Løten decidis okaze de la 41a Norvega Esperanto-Kongreso nomi unu straton en la centro de la vilaĝo «Esperantovegen» (La Esperanto-vojo). La inaŭguro de la nova strato okazis tuj post la fermo de la kongreso.

Kiam la kongresanoj alvenis al la enirejo al la nova strato, Esperantaj standardoj flirtis de du flagstangoj flankantaj la enirejon, kaj apud unu el la flagstangoj troviĝis pupitro kun verda stelo



Per Johan Krogstie paroladas ĉe la inaŭguro de la Esperantostrato en Løten.

en blanka cirklo, aparte konstruita por la okazaĵo.

La 22an de Junio, akurate je la 16a horo, alvenis procesie Løiten Sangforening kaj Ådalsbruk Musikkforening. La blovorkestro ludis Esperanto-melodiojn, i.a. la Kluban Marŝon, kaj haltinte ĉe la enirejo Løiten Sangforening kantis «Bautar» de Per Sivle.

Nun Per Johan Krogstie suriris la pupitron kaj en apela parolado klarigis al la ĉeestantoj pri Esperanto kaj pri la simbola signifo de la nova vojnomo. Poste urbestro Hjelsengsveen oficiale inaŭguris la novan vojon per tre komprenema parolado, per forpreno de la verda tuko, kiu kovris la nom-ŝildon, kaj fine per tondado de la verda kaj

Daŭr p. 79

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

Adreso de la redakcio: Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

Anoncprezoj: 1/4 pago kr. 150,—,
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—,
1/8 p. kr. 19,—.

Norvega Esperantisto

Kelkajn numerojn redaktis Hans Amund Rosbach sola, sed nun la ĉefredaktoro denove transprenas, kunlabore kun HAR.

Ĉi tiu numero estas plena de raportoj kaj similaj aferoj. Tio estas komprenebla en la unua post-somera numero. Norvega Kroniko kaj artikoloj kaj literaturaĵoj devas atendi ĝis la postaj numeroj. Ĉi-foje ni trovis pli bone tiel fari, anstataŭ dividi la raportojn, — kompreneble la opinioj pri tio estas diversaj, tiel ke oni ne povas ĉiun kontentigi.

Tio, kion ni nun tre deziras, estas la kunlaboro de la legantoj por krei vere valoran gazeton — kaj la kunlaboron de ĉiuj norvegaj esperantistoj por varbi novajn membrojn. Novaj membroj de NEL estos novaj abonantoj — kaj novaj verkantoj.

Daŭr de p. 78

blanka ŝnuro, kiu baris la eniron al la Esperanto-vojo. Fine Løiten Sangforening kaj Ådalsbruk Musikkforening kantis kaj ludis La Esperon.

Post la ceremonio la tuta ĉeestintaro marŝis post la orkestro al Tingberg Kafejo, kie la komunumo Løten regalis per kafo kaj kukoj.

Ĉi-foje nek la radio nek la televido «kovris» la okazaĵon, oni respondis ke similajn eventojn oni jam dufoje elsendis en nia lando. Eble ni rajtas el tio konkludi ke inaŭguro de Esperanto-stratoj en nia lando nun fariĝis ordinaraĵo! Estu kiel ajn, ni sincere gratulas al nia nelacigebla Per Johan Krogstie, kiu jam estas patro de du Esperanto-stratoj. Kiu loko nun sekvas?

Partopreninto.

LINGUAPHONE-KURSO

Vidvino de esperantisto deziras vendi la Linguaphone-kurson de sia mortinta edzo. Prezo kr. 75,00. Interesiĝantoj skribu al N.E.L., Boks 942, Oslo 1.

LEGADO POR BLINDAJ SAMIDEANOJ

Ni serĉas bonvolulojn, kiuj havas tempon kaj estas pretaj por legi Esperantan literaturon sur sonbendojn. Tiuj bendoj povus cirkuladi inter niaj blindaj membroj.

Kelkaj blindaj esperantistoj en Oslo ankaŭ deziras kontakton kun esperantistoj, kiuj volus disponigi

iom da tempo por rekte laŭlegi al ili Esperantan literaturon.

Bonvolu turni vin al N.E.L., Boks 842, Oslo 1.

SUBTENANTAJ MEMBROJ
DE N.E.L. 1969

Elna Matland, Sauda.
Johan Matland, Sauda.

LA KONTORFONDAJO

Pli frue	kr. 994,00
R. Bugge-Paulsen .. »	30,00
C.S.B. »	30,00
Partoprenintoj	
en Budor »	60,00
	<u>kr. 1 114,00</u>

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

Sciigoj de N.E.L.

La aŭtuna laboro. La Liga Estraro insiste admonas ĉiujn klubojn kaj membrojn nu fari eksterordinarajn klopodojn por progresigi Esperanton en sia loko. Absolute ĉiu klubo kaj laŭeble multaj rektaj membroj devas nu starigi almenaŭ unu kurson. Se neniu loka esperantisto povas gvidi kurson, kolektu interesiĝantojn en studrondo, kiu povas lerni per la korespondanta kurso; provu igi iun gazeton en via loko publikigi nian gazetan kurson. Vidu ankaŭ la pasintan numeron de Norvega Esperantisto.

Taskotabelo por kluboj. — *Oktobro:* La kluboj aranĝas kunvenojn por ĉiuj esperantistoj en la loko (ĉiuj, kiuj iam partoprenis kurson, laŭeble oni sendu invitilon al ĉiu unuope. La kunveno estu planita kun la celo (re-)membrigi ilin. Ĉirkaŭ la 24a de Oktobro ĉiuj kluboj aranĝas kunvenon dediĉitan al la Tago de U.N.O. — La kasisto sendas al N.E.L. (kaj al la distrikto) kotizon kaj liston de novaj membroj kaj de eventualaj malfrue pagintaj malnovaj membroj. Ekstrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

La 55a Universala Kongreso de Esperanto okazos en Vieno, Aŭstrujo, somere 1970. Detaloj sekvos.

Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono. Oni okazigis 2 estrarkunvenojn kaj elsendis al la kluboj 2 cirkulerojn, el kiuj unu speciale pri iniciato inter skoltoj. Oni decidis kiel kutime unuigi n.rojn 5/6 kaj 9/10 de Norvega Esperantisto kiel duoblajn n.rojn, kaj daŭrigis la esplorojn pri malpli multekosta presigo. Dokumenta CED/7 finfine estos nun broŝurita.

Oni decidis presigi poŝtkartformatan informbroŝureton, kaj diskutis pri aliaj broŝuroj. Oni decidis esplori la bezonon por nova lernolibro. La 41a Norvega Esperanto-Kongreso okazis en Budor, Løten, 21.—22. Junio. Oni nomis C. Støp-Bowitz kiel reprezentanton de N.E.L. en la Inaŭguro de la 54a U.K. en Helsinko, kaj decidis proponi R. Bugge-Paulsen kiel reprezentanton de la Norvega Registaro.

La Liga Estraro.

Informoj de la Ekzamena Komisiono

Ekzamenoj plenumitaj. En Majo elementan ekzamenon en Oslo sukcese plenumis Astrid Bremserud, Harald Triveld, Halvor Ueland.

Ordinaraj aŭtunaj ekzamenoj. Ekzamenoj okazos ĉirkaŭ la 1-a de Decembro 1969. Instruistan ekzamenon oni povos fari en Oslo, superan kaj elementan ekzamenojn en Oslo, Bergen, Haugesund, Sarpsborg, Sauda, Tromsø kaj Trondhejmo. Oni anoncu sin sur la presitaj skemoj riceveblaj de la lokaj ekzamenaj komitatoj aŭ rekte de la Ekzamena Komisiono. Oni sendu la skemojn al tiu komitato, ĉe kiu oni intencas fari la ekzamenon, antaŭ la 1-a de Novembro. Personoj, kiu faros la ekzamenon ne en Oslo, plenigu po 2 — du — skemojn. *Plenigu la skemojn precize kaj komplete!* — *Aliĝoj, kiuj alvenos post la 1-a de Novembro, ne estos konsiderataj.* Jenaj helpiloj por sinpreparado al ekzamenoj estas aĉeteblaj ĉe la Ekzamena Komisiono, Boks 942, Oslo 1, poŝtgirokonta 100.34:

Ekzercaj taskaroj: Kajero I: traduktaskoj por elementa ekzameno. Kajero II: diktaĵoj por elementa ekzameno. Kajero III: traduktaskoj por supera ekzameno kaj taskoj por instruista ekzameno. Prezo por unu kajero: kr. 1,00 + afranko.

Vortlisto por Adi: La Forto de l' Vero, kr. 0,50 + afranko.

Ekzamena Regularo kun ekzamenaj programoj kaj konsiloj pri lernolibroj kaj literaturo, kr. 0,50 + afranko.

Notu ke ĉi tiujn helpilojn oni aĉetas ĉe la Ekzamena Komisiono. Ekzamena Komisiono de N.E.L.

C. Støp-Bowitz
prezidanto.

ERLING ANKER HAUGEN
60-JARA

Nia plej eminenta esperanto-poeto kaj tradukisto, disponanto Erling Anker Haugen, Trondheim, fariĝis 60-jara la 11an de aŭgusto. Li esperantistiĝis en 1925 kiel aŭtodidakto, kaj de post 1936 li estas membro de Grupo Esperantista de Trondheim. Li estis Vicdel. de UEA por Trondheim 1939—45

kaj Del. de post 1945. La saman jaron li ankaŭ plenumis la superan ekzamenon de Esperanto.

Sed lia laboro por Esperanto estas ĉefe sur la literatura flanko. Liaj plej gravaj kontribuoj estas la tradukoj de la majstroverkoj de Ibsen: «Peer Gynt» (Thm. 1951) kaj «Brand» (aperonta). Li ankaŭ estis kunlaboranto de «Esperanto-Norsk Ordbok» (Oslo 1949), kunredaktoro de «Nia Kantaro» (Oslo 1954) kaj kunverkanto de «Norsk-Esperanto Ordbok» (Oslo 1963).

En 1955 li fariĝis kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO.

Niajn plej korajn gratulojn kaj salutojn! *LKH*

HENRY FRIDÉN 65-JARA

Unu el la pioniroj de la Esperanto-movado en Halden, kontoristo Henry Fridén, fariĝis 65-jara la 27an de aŭgusto. Li esperantistiĝis jam en 1920 kiel aŭtodidakto. En 1924 li fariĝis estrarano de Norvega Asocio de Laboristaj Esperantistoj (NALE), kaj en 1935 li fondis la klubon «Ascendo», kiu tuj aliĝis al NALE. Nur en 1944 la klubo aliĝis al NEL. Depost 1935 Fridén estas la sola prez. de la klubo «Ascendo»! Fridén estis Del. de UEA por Halden 1927—30 kaj de post 1945. Li ankaŭ estas Fakdel. (muziko) de post 1958. Dum multaj jaroj li redaktas la rubrikon «Por novuloj kaj lernemuloj» en Norvega Esperantisto.

Fridén estas unu el niaj plej eminentaj tradukistoj de poemoj en Esperanton, kaj jenajn fojojn li

premiigis en la Belartaj Konkursoj de UEA en la branĉo tradukita poezio: 1953 (5a premio), 1956 (laŭda mencio), 1958 (3a premio), 1961 (3a premio), 1962 (2a premio) kaj 1964 (4a premio).

En 1955 li fariĝis Kavaliro de la 2a klaso de PRO MERITO.

Ni sendas niajn plej korajn salutojn al la jubileulo! *LKH*

KAREN BERGE 80-JARA

La 15an de Majo s.ino Karen Berge en Sauda povis festi sian 80 jaran datrevenon. Estas neniu sekreto ke ŝi estas unu el la plej fervoraj membroj de tiu klubo. Ĉiam ŝi aktive partoprenis kunvenojn kaj aranĝojn, lokajn, distriktajn, landajn kaj eksterlandajn. Ŝi ankaŭ dum periodo funkciis kiel delegito de UEA en Sauda.

Pli ol iu alia ŝi malfermis sian hejmon por la esperantistoj, kaj malavare gastigis ilin. Dum malfacilaj periodoj ŝi sukcesis doni novan fervoremon al la aliaj klubanoj. Samideanoj en Sauda vizitis ŝin je la mejloŝtono, kaj la prezidantino de la klubo donacis al ŝi belajn florojn, dankante pro la granda laboro kiun ŝi faris por Esperanto.

Kortega konsilisto

HUGO STEINER

mortis en sia 92-a jaro la 1-an de aŭgusto post kelkmonata grava malsano. Hugo Steiner estis la fondinto de Internacia Esperanto-Muzeo en Vien.



Li estis Honorprezidanto de la Unuiĝo «Internacia Esperanto-Muzeo en Vien», Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio, Honora Prezidanto de Austria Esperanto-Movado, Honora Prezidanto de Austria Federacio Esperantista Fervojista kaj honor-membro de multaj aliaj organizoj. Li posedis la Honormedalon de ICK, la Austrian Honorkrucon por Scienco kaj Arto kaj diversajn aliajn en-kaj eksterlandajn distingojn.

OTTO KOREN forpasis

Dum la kongreso en Helsinko li estis sana kaj vigla. La 4an de Aŭgusto, du tagojn post la reveno, li eksentis malbonfarton kaj forpasis en la daŭro de la tago, apenaŭ 46-jara.

Otto Koren esperantistiĝis antaŭ proks. 12 jaroj. Esperanto fariĝis lia granda intereso, kaj li fariĝis lerta majstranto de la lingvo. Tre modesta li estis, sed regula ĉeestanto en la klubkunvenoj en Oslo. Dum kelkaj jaroj li estis la plej konsciencplena kaj akurata kasisto de la klubo, kaj dum la lastaj jaroj anstataŭanto en la Liga Estraro, kie liaj sekhumoraj rimarkigoj estis alte ŝatataj. Same ŝatata li estis kiel amator-aktoro en multaj skeĉoj. Liaj amikoj en Klubo Esperantista en Oslo ame kaj danke memoros lin, dezirante pacon al lia memoro.

S. A. PEDERSEN forpasis

Tajlormajstro Simon Andreas Pedersen, Trondheim, mortis la 27an de julio. Ni naskiĝis en Narvik la 2an de februaro 1893 kaj lernis Esperanton aŭtodidakte en la jaro 1930, kun helpo de Alfred Eriksen. Kiam Eriksen antaŭ kristnasko 1930 fondis Narvik Esperantoklubb, Pedersen tuj fariĝis ĝia membro.

En 1935 Pedersen partoprenis kurson de O. T. Nicolaisen en Narvik. Post tiu kurso Narvik Esperantoklubb refondiĝis sub la nomo «Malmsonoro», kaj Pedersen fariĝis ĝia vicprezidanto, kaj en 1936—37 li estis ĝia prezidanto.

Aŭtune 1937 Pedersen translokiĝis al Stokmarknes, kie li gvidis kurson, kaj post ĝi Stokmarknes Esperantoklubb fondiĝis kun 17 membroj. La klubo ne aliĝis al NEL.

Poste Pedersen translokiĝis al Trondheim, kie li partoprenis kurson de Emil Strohmeier el Munkeno, kaj fariĝis membro de la Esperanto-Grupo Fremad en Trondheim 1938—41. Depost 1944 li estis membro de Grupo Esperantista.

Pedersen estis modesta kaj simpatia homo.

Pacon al lia memoro!

LKH

*



FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA
ESPERANTISTA FERVOJISTA
ASOCIO - NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek,
Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Deziras korespondi pri ĉiutagaj temoj S.ro Vlastimil Rezníček, adreso: Revolucní 21 Horní Mošnice u Prerova, Morava Ĉeĥoslovakio.

La Breifoss - akcidento

Nokte la 28an de februaro 1944 trans la altmontaro de la Bergenfervojo, malvarmega nokto kun brilanta stela ĉielo kaj flamanta arktolumo kaj ÷ 29 celsiusgradoj en Finse. Grandega vaporlokomotivo, vartrajnmaŝino kun 10 movigradoj kaj potenca frontplugilo brue veturas orienten laŭ la montaro kun sia multvalora kargo: 10 cisternvagonoj kun oleo kaj benzino. Antaŭ ili 2 tegitaj varvagonoj kun haringbaretoj survoje al Germanujo, plej malantaŭe 2 netegitaj varvagonoj kaj la konduktorvagono. Oleo kaj benzino estas la krudaĵo de la milito kaj la plej sortoplana mankovaro de la germanoj. Dum la tuta milito alvenis al Oslo fluanta hejtaĵo kiu de tie distribuiĝis per trajno al ĉiuj partoj de la lando. Car trajno

kun oleo kaj benzino ĝus alveninta al Bergen resendigis orienten trans la montaro la onidiroj ekfunkciigis. Laŭ «kutime informita fonto» estis rakontata ke Hitler persone donis ordonon ke la batalŝipo «Tirpitz», kiu troviĝis en sia restadejo inter Tromsø kaj Hammerfest, partoprenu en la ĉasado kontraŭ la konvojoj de la Interligitaj Nacioj, al Arkangelsk. La granda amaso da hejtaĵo, proksimume 11 000 tunoj kiun oni bezonegis por pretigi la batalŝipon por ekspedicio, absolute devus esti sendota norden.

Kaj la malgranda cisterntrajno, trajno 1428, facile grimpas trans la Taŭgevannpinto, haltas momenton en Finse kaj daŭrigas al Haŭgastøl kaj Ustaoset. La enkaldrona premo estas en ordo, la bremsoj funkcias ĝustamaniere, la maŝino havas pli ol sufiĉe da fortoj kaj la viroj en la lokomotivo ne havas afliktojn. Sed post kiam la trajno pasis Ustaoset stacion kaj descendas al Geilo, la lokomotivestro Olav Fossgård sentas ke la bremso ne ĝuste efikas.

(Daŭrigota)

La 54a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko

Sabaton matene la 26an de Julio kolektiĝis en la flughaveno de Oslo la anoj de la norvega kongreskaravano, kaj post du «saltoj» de po ¾ horo ni estis jam en Helsinko. La kongreso tamen ne okazis tie, sed en vilaĝo Otaniemi, studenta centro ekster la ĉefurbo. Tia lokigo estas ja praktika, ĉar preskaŭ ĉiuj kongresaj aranĝoj kaj la hotelo de la plimulto troviĝis tre proksime unu al la aliaj.

La Kongresejo, Dipoli (Domo de Asocio de Studentoj de Tefniko), estis unuavide enigma, labirinta kuniklejo, la plej konsekvenca sensimetria konstruaĵo, kiun povis elpensi arkitekta cerbo. Bela? Tio dependas de la gusto. Sed taŭga, kiam oni fine konatiĝis kun ĝi. La kutimaj giĉetoj bone funkciis en la teretaĝo, sed nek en la banka, nek en la poŝta oni parolis Esperanton, same kiel en la memserva restoracio sur la unua etaĝo, kiu ĉetere ebligis al okupitaj kongresanoj rapide satigi sin inter la multaj kunvenoj.

Laŭ la Suplemento al la Kongresa Libro aliĝis 1766 kongresanoj, sed mi konstatis kongresanon 2002. Aliĝis ĉi-jare 41 norvegoj, el kiuj 40 ĉeestis, do pli multaj ol dum multaj jaroj (sed aliĝis duoble tiom da japanoj!). El ili 28 aliĝis per nia Turisma Servo, kaj nur 18 al ĝia karavano.

La Interkonatiĝa Vespero (daŭre amputita al «Interkona») havis tre taŭgan ejon en la granda fest-

halo, kie oni libere moviĝadis kaj facile trovis multajn konatojn (ne konojn!) kaj konatiĝis kun aliaj.

La Inaŭguro okazis en la Foira Halo de Helsinko, ankaŭ tre taŭga por la celo, kaj aro da aŭtobusoj prizorgis la transportadon. Sur la podio la estraro kaj la salutontoj antaŭ la granda kongresa flago. Malfermis la prez. de U.E.A., prof. Lapenna. Salutoj de reprezentantoj de la finna registaro, de la urbestro de Helsinko kaj de la prez. de L.K.K., s.ro Narvala. Sekvis salutoj de 12 registaroj (por la norvega: R. Bugge-Paulsen) kaj de la Esperanto-organizaĵoj en 32 landoj (por N.E.L.: C. Støp-Bowitz). Fine festparolado de prof. Lapenna, kiu koncentriĝis pri la fenomeno de lingva diskriminacio; miaopinie lia ĝis nun plej bona. Kaj poste nur silenta foriro, sen kantado de «La Espero». Mankis la kulmina punkto, kaj mi aŭdis nur indignajn kondamnojn pri tiu misdecido de la estraro de U.E.A., kiu laŭdire timas ke nia Himno sektece impresas al la oficialaj reprezentantoj. Sed eĉ diplomatoj devas aŭskulti la naciajn himnojn de gastigantaj landoj! Ĉu nia Himno ne estas samvalora?

Ankaŭ la Diservoj okazis en preĝejoj en Helsinko, kio kredeble kaŭzis malpli multnombran partoprenon.

Malagrablaĵo estis la preskaŭ kompleta manko de indikiloj, sed mi fine sukcesis eltrovi ke la

Teĥnika Altlernejo, kie estis okazontaj la prelegoj de la Internacia Somera Universitato, situas trans la ĉefstrato. La temoj estis agrable variaj kaj interesaj, estis entute 9 prelegoj; sed kial oni malakceptis proponitan prelegon de prof. Popoviĉ pri la aktualega temo de spacveturado, ĝuste en la nuna jaro!?

La dimanĉo finiĝis per Finna Vespero sub gvidado de bonega anoncanto s.ro Melasniemi. Finna muziko kaj popoldancoj, Kalevala-kavalkado kaj ĥor-kantado. Iom tro longa, sed bela kaj interesa impresio pri la kongreslanda kulturo. Sed oni bedaŭrinde malfermis la pordegon al la restoracio, kie bruo kaj babilado malhelpis la bonan aŭskultadon.

La ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A. estis interesaj kaj valoraj, precipe pro la diskutado pri «La lingva problemo en la kadro de la monda politiko kaj la taskoj kaj la idea bazo de la Esperanto-organizaĵoj». Nova programero estis publika debato pri la temo «Esperanto — ĉu ideologia aŭ praktika instrumento?» La plimulto de la debatantoj trovis ke hodiaŭ la praktika flanko estas pli grava ol la ideologia, kvankam sendube daŭre ambaŭ flankoj valoras.

La Komitato de U.E.A. kunsidis 5-foje. Kvankam la kunsidoj estas publikaj, mirige malmultaj kongresanoj volis aŭskulti la traktadojn de tiu «parlamento» de nia movado. Grava decido estis ke oni denove trovis necese plialtigi la

kotizojn de Individuaj Membroj per 20 %/o. Estas demando ĉu ne nun baldaŭ estas tempo serĉi pliajn enspezojn aliloke ol en la poŝoj de la membraro. Inter aliaj decidoj, pri kiuj vi povos legi en la revuo ESPERANTO, estis formado de konstantaj komisionoj interne de la Komitato, por aktivigi la Komitatojn ankaŭ ekster la kongresa semajno. La subskribinto aliĝis al Komisiono pri Landaj kaj Fakaj Asocioj. Cetere fondiĝis komisionoj pri informado, financoj, turismo, kaj pri literaturo kaj eldonado. Oni ankaŭ elektis estraron: reelektiĝis prez. Lapenna, vicprez.oj Wensing kaj Carlén, ĝen. sekr. Becker, estrarano Woessink, novaj estraranoj elektiĝis J. Uspienski, U. J. Moritz, J. Thierry.

La bankedo kaj la balo okazis jam lundon vespere, en la sama salono kiel la Interkonatiĝa Vespero. Bona dancorkestro, sed iom malgranda danc-loko, kion oni riparitis per dancado ankaŭ en apudaj haloj. Inter la dancoj oni povis laŭplaĉe aĉeti manĝaĵojn kaj trinkaĵojn en la memservejo, kion varmaj dancemuloj kaj rigardantoj diligente utiligis.

Bonega aranĝo estis ŝipekskurso de Otaniemi tra la haveno de Helsinko, al kajo proksime al la Urba Teatro, kie okazis la teatra prezentado (po duono de la kongresanoj marde kaj merkrede). La prezentado konsistis el du serbokroataj kaj unu franca unuaktaĵoj, sed kial oni ne elektis finnajn? Entute la elekto de la teatra-

ĵoj malplaĉis al la subskribinto; ekz. «komedio» pri la malsana menso de frenezulino al mi ŝajnas nedecaĵo. Al la miksitaj publiko de kongreso oni prezentu ion gajan, ekz. veran komedion. Ankaŭ la t. n. libervola teatra prezentado antaŭvidis du jugoslavaĵojn, sed la dua ne estis prezentata, ĉar ĉefaktorino rompis brakon. La alia estis satiraĵo, laŭ diro de kompetentuloj ĝi estis bonege ludata, sed laŭ herezulo kiel mi ankaŭ ĝi ne estis tre trafe elektita. — La junulara vespero laŭdire ampleksis nur dancadon.

La tradicia rondveturo en la kongresurbo estis modela, la perfekta esperantista gvidanto donis sufiĉajn, sed ne troajn klarigojn, kiuj postlasis veran impreson pri la urbo. Jaŭdon okazis tri tuttagaj ekskursoj, al Porvoo, Lahti kaj Hämeenlinna. Mi elektis tiun al Porvoo, kie oni vizitis i.a. la hejmon de Runeberg kaj grandan presejon. Cetere restis tempo por promenado kaj butikumado. Lunĉo kaj kafo en luksa restoracio. Bedaŭrinde la urbo havigis nesesperantistan gvidanton, kaj la ĉiama tradukado estis laciga.

La Belartajn kaj Oratoran Konkursojn mi ne povis ĉeesti, sed en la Oratora partoprenis laŭdire nur 3 konkursantoj.

Merkredon posttagmeze okazis Oficiala Akcepto de invititaj kongresanoj ĉe la Urbestro de Helsinko; la vicurbestro, s.ro Loimaranta, salutis en perfekta Esperanto, kaj montriĝis ke li efektive iom parolas la lingvon. Poste abunda

regalo. Post la akcepto mi estis, kune kun kelkaj gvidaj personoj, invitita al la belega hejmo de parlamentanino Tyyne Leivo-Larsson, la iama finna ambasadorino en Oslo, kie ni pasigis tre agrablan kaj interesan vesperon.

La vendredo finiĝis per Varia Arta Vespero, denove sub gvidado de s.ro Melasniemi: koncerto de Roland Dupuis, sorĉisto, japana muziko per ŝamiseno, knabina gimnastiko, kanto de Sirkka Lehtivaara, jugoslava skeĉo (ĉi-foje vere amuza komedio), kaj vere amuza pop-arta prezentado.

Sabaton matene la Ferma Kunsido akceptis du kongresajn rezoluciojn. La unua atentigas pri la lingva diskriminacio kaj proponas al la registaroj de ĉiuj ŝtatoj solvi la dilemon per ĝeneraligo de la uzo de la Internacia Lingvo en mondaj kadroj. La dua alvokas al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj intensigi siajn agadojn por realigi la ĉefajn celojn de la Laborplano de U.E.A.. Sekvis transdono de la granda kongresa flago al reprezentanto de la L.K.K. en Vieno. La solenaĵon finis kantado de nia Himno — sen muzika akompano (la Fermon ja ne ĉeestas la timataj oficialaj reprezentantoj!).

Finiĝis sukcesplena kongreso, kiun benis senĉesa varma, belega somera vetero. Iuj iris al postkongresaj ekskursoj, aliaj rekte hejmen sed ĉiuj kun sincera «Ĝis revido!» al malnovaj kaj novaj gekonatoj.

C. Stöp-Bowitz.

Protokolo

pri la ĝenerala kunsido de N.E.L. dum la 41-a Norvega Esperanto-Kongreso en Løten 21.—22.de Junio 1969.

TAGORDO:

1. *Malfermo:* La prezidanto de N.E.L., C. Støp-Bowitz, malfermis la kunsidon. Li esprimis sian dankon al la klubo en Løten pro la bona akcepto, kaj salutis la ĉeestantojn. Li memorigis jenajn membrojn de N.E.L., kiuj forpasis dum la lastaj du jaroj:

Egil Houen, Trondhejmo
Erik Harildstad, Trondhejmo
Ragnvald Rian, Trondhejmo
Hans Nesje, Ålesund
John A. Stavenes, Stavenesli
Ragnvald A. Skjegstad,
Heimdal

Dordi Johansen, Oslo
Jon Norstrøm, Elverum
Klara Dypvik, Trondhejmo
Halfdan Hansen, Hana pr.
Sandnes

Johan A. Kleven, Hamar
Aagot Sletterød, Oslo
Th. Engebretsen, Oslo
Sigrid Dietrichson, Oslo

Nils H. Midthus, Lidarås
Edith Stray, Oslo
Beryl Jensen, Oslo
Gustav Johannessen, Hamar
Johs. Jahren, Bergen
Ragnar Mürer, Trondhejmo

Oni honoris la mortintojn per mallonga silento.

2. *Elekto de kunvenaj funkcioj:* Oni elektis jenajn:

Kunvenprezidanto: Johan Matland, Sauda; Elekta komitato: Harda Danielsen, Oslo, Ole Johan Rønnevig, Haugesund kaj Per Engen, Hamar; Komisiono por kontrolo de plenrajtoj kaj voĉnombrado: Otto Koren, Oslo kaj Klara Dahl, Haugesund; Protokolantoj: Signe Korstvedt kaj Kirsten Ek, ambaŭ Oslo; Rezolucia komisiono: Elna Matland, Sauda, kaj Olav Thormodsen, Haugesund. La kontrola komisiono poste prezentis sian raporton, kiu montris jenan dividon de la voĉoj:

Reprezentas:	Reprezentantoj:	Nombro da voĉoj:	
Bergen	Elna Matland	16	
	Johan Matland	15	31
Gjøvik	Asbjørn G. Langseth	2	
	Kåre Mehlum	3	5

Hamar	Per Engen	4	
	Ragna Johannessen	4	
	Elise Koller	4	
	Else Stang	4	16
Haugesund	Klara Dahl	15	
	Ole Johan Rønnevig	15	
	Olav Thormodsen	15	45
Jørpeland	Elna Matland	3	
	Johan Matland	3	6
Løten	Øyvind Kverneng	11	11
Odda	Trygve Reisæter	6	6
Oslo	Agnete Anjer	6	
	Ludvig Anjer	6	
	John Berggreen	7	
	Else Bugge-Paulsen	6	
	Rolf Bugge-Paulsen	6	
	Lovise Bøe	6	
	Thor Magnus Carlsen	7	
	Harda Danielsen	6	
	Marit Delor	6	
	Kirsten Ek	6	
	Randolf Grotmål	6	
	Kjell Gustavsen	6	
	Aase Gustavsen	6	
	Kari Kalsås	6	
	Otto Koren	6	
	Signe Korstvedt	6	
	Gerd Jæger Pettersen	6	
	Aslaug Refsing	6	
	C. Støp-Bowitz	6	
	Eva Støp-Bowitz	6	
	Annalise Torgnes	6	
	Brynhild Østmo	6	134
Sauda	Elna Matland	10	
	Johan Matland	9	19

Trondhejmo	Aslaug Karterud	15	
	Halvdan Karterud	20	35
		---	---
			308
Rektaj membroj:	Berta Ingebretsen	1	
	Valborg Malling	1	
	Olaf Nyberg	1	
	Hans Amund Rosbach	1	
	Kjell Walraamoen	1	5
		---	---
			313

3. *Jarraportoj 1967 kaj 1968:* C. Støp-Bowitz kaj J. Berggreen laŭtlegis tiun pri la jaro 1968, kaj oni ankaŭ havis antaŭ si la raporton pri 1967. Post kelkaj demandoj, kiujn la prezidanto kaj la ĝenerala sekretario kontentige respondis, ambaŭ raportoj estis aprobatataj.

4. *Jarkalkuloj 1967 kaj 1968:* Otto Koren laŭtlegis la jarkalkulon 1968, kaj oni havis antaŭ si ankaŭ tiun por la jaro 1967. J. Berggreen menciis, ke la deficiton en la jarkalkulo grandparte kaŭzis la elspezoj por «Norvega Esperantisto». Kelkaj membroj esprimis la deziron estonte vidi el la kalkulo kiuj elspezoj kaj enspezoj koncernas «Norvegan Esperantiston». Post kelkaj demandoj la kalkulo estis aprobatata.

O. Koren laŭtlegis la raporton pri la Korespondaj Kursoj. C. Støp-Bowitz laŭtlegis leteron de la revizoro, kiu proponas altigon de la prezoj. Støp-Bowitz informis pri revizio de la elementa kurso

laŭ modernaj postuloj. Tiam la prezoj estos samtempe reviziataj en kunlaboro kun «Folkets Brevskole». La kalkulo estis aprobatata.

5. *Alvenintaj proponoj:*

a) *Honoraj membroj:* Laŭ enŝenditaj proponoj de Klubo Esperantista en Oslo kaj la Liga estraro, oni elektis unuanime jenajn novajn honorajn membrojn de N.E.L.: Tharald Dybing kaj Rolf Bugge-Paulsen, ambaŭ Oslo.

b) *Altigo de kotizoj:* C. Støp-Bowitz klarigis pri la granda deficiton en la jarkalkulo kaŭze de la kreskantaj preskostoj por «Norvega Esperantisto». Ekzistas tri eblaj solvoj: 1. redukto de la paĝnombro, 2. altigo de la kotizoj, 3. kreskigo de la membronombro. Li ankaŭ prezentis konkretan proponon de la kasisto, Karl Ekhaugen, kiu pro malsano ne ĉeestis:

Altigo de kotizo por rektaj membroj de kr. 20,00 al kr. 25,00.

Altigo de kotizo por rektaj junulaj membroj de kr. 7,00 al kr. 10,00.

Altigo de kotizo por ordinara klubmembroj de kr. 15,00 al kr. 20,00. Por aliaj kategorioj neniuj altigo.

Sen diskuto la ĉeestantoj aprobis la proponon pri kotizaltigo en la nuna situacio. H. Karterud, J. Berggreen kaj E. Matland substrekiis la gravecon de alternativo 3 kaj menciis la eblecon kreskigi la enspezojn pere de anoncoj.

c) *Rezolucio:* J. Berggreen prezentis rezoluciproponon, kiun oni unue diskutis, poste transdonis al la Rezolucia komisiono por finredaktado. Oni aprobis ĝin en la jena formo:

RESOLUSJON

Norsk Esperanto-Forbund samlet til Landsmøte på Løten 21.—22. juni 1969 har enstemmig vedtatt å henlede myndighetenes oppmerksomhet på

verdens aktuelle språkproblem, slik det eksisterer idag, som en vesentlig hindring for kontakt mellom nasjonene.

Dette vil ytterligere aksentueres når *verdensfjernsynet* realiseres om noen få år. Utviklingen av satellittsambandet vil muliggjøre en verdensomspennende *samtidig* fjernsynssending uavhengig av landegrensene. —

Vi mener at verdens språkproblem må få sin løsning ved at det internasjonale språket *Esperanto* blir innført i alle land.

Vi tillater oss derfor å rette en oppfordring til ledelsen innen turistsektoren, skoleverket og Norsk Rikskringkasting om å stille

seg velvillig til vårt Forbunds opplysningsvirksomhet, og å støtte oss aktivt i vårt arbeid med å utbre Esperanto.

La rezolucio oni transsendos al la sekvantaj instancoj: Kirke- og Undervisningsdepartementet, Bygdøy Allé 1, Norsk Rikskringkasting, Bjørnstjerne Bjørnsons plass 1, Landslaget for Reiselivet i Norge, H. Heyerdahls gate 1, Samferdselsdepartementet v/ Hotell- og Turistdirektoratet, St. Olavsgt. 35.

6. *Kiel denove aktivigi la norvegan Esperanto-movadon kaj kreskigi la membronombrojn?*

Tiu problemo estis diskutata dum la landa Kongreso en Sauda 1967, kaj oni starigis komisionon, konsistantan el F. Aasheim, Oslo, prezidanto, Otto Prytz, Oslo, Per Johan Krogstie, Løten, Johan Matland, Sauda kaj Trygve Kvalvåg, Stavanger, kun la mandato analizi la situacion de la Esperanto-movado en Norvegujo, fari proponon pri ŝanĝoj de la labormetodoj kaj provi aktivigi la junajn membrojn. La tasko de la tiel-nomata Aasheim-komisiono estis elabori skriban raporton prezentotan al la Liga Estraro plej malfrue antaŭ la Landa Kongreso en 1969. Pro diversaj malfacilaĵoj la komisiono neniam plenkunsidis, kaj oficiala raporto ne estas ellaborita. Tamen O. Prytz ellaboris personan raporton pri la temoj, kiujn la komisiono pridiskutis. Antaŭ ol la ĝenerala kunsido komencis diskuti la

punkton 6 de la tagordo, C. Støp-Bowitz laŭtlegis la raporton de O. Prytz kaj aldone substrekis la konkludon de la lasta jarraporto: la natura perdo de membroj estas normala, sed la problemo estas, ke ne venas sufiĉe multaj *novaj*.

Precipe ni bezonas junajn membrojn por certigi la estontan vivon de la Esperanto-movado en nia lando.

J. Berggreen informis pri la konkretaj planoj.

a) Reklamo en kinejoj.

b) Informado inter la skoltoj, kiuj reprezentas milojn da junuloj en nia lando kun kontaktoj en ĉiuj mondpartoj. Detalan programon pri la agado ricevos la esperantistoj aŭtune.

c) Informado inter la soldatoj kaj maristoj estas ankaŭ en preparo.

Multaj ĉeestantoj utiligis la okazon subteni la agadplanon, prezentitan de J. Berggreen kaj laŭdi la raporton de O. Prytz pro ĝia sincereco kaj konkretaj proponoj. Precipe oni diskutis kiel eduki taŭgajn gvidantojn por kontakti la junulojn kaj gvidi studrondojn, kaj kiel eduki Esperanto-instruistojn. Oni priparolis la eblecon aranĝi seminarin, kaj oni vigle diskutis la proponon de E. Matland pri salajrita vojaĝsekretario. La lasta propono havas konsiderindan ekonomian flankon, sed

estas alloga ideo, kiu vekis grandan intereson kaj simpatian. Oni ankaŭ tuŝis la temon: Esperanto en televido, radio kaj gazetoj, sed tiu temo estas malnova, kaj neniu nova, menciinda ideo aperis. La konkludo estas, ke la Liga Estraro kaj ĉiu unuopa esperantisto, ĉiu en sia loko, ĉiam atentu la eblecojn. (Daŭrigota)

Raportis:

Signe Korstvedt kaj Kirsten Ek.

Malgraŭ la bonaj intencoj ni devas dividi la raporton. La ĉefa kaŭzo estas la grandaj literoj, kiujn uzas la presejo. *Red.*

NORSK ESPERANTO-FORBUND

(*Norvega Esperantista Ligo*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S

(*Eldonejo Esperanto A/S*)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo 6. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj
sendaĵoj. — Telefono: 54 727

Ekspedejo de Norvega Esperantisto:

Boks 942, Oslo 1.

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar